



La Suda Kraco

Oficiala Organo de la Australasian Esperanto Association.

Redakcio-Administracio:

Box 1367, Elizabeth-str: P.O.,
Melbourne (Aŭstraliō)

Abono (por dek du numeroj):

Aŭstralia: 4 ŝilingoj kaj 6 penco.
Ekster Aŭstralia: 5 ŝilingoj,
aŭ 24 respondkuponoj.

Unu numero: 4 penco aŭ 2 respondkuponoj.
Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo aŭ 5 respondkuponoj.

N-ro 15. Melburno (*Melbourne*), Aŭstralia. 10 Septembro, 1921.

THE XIIIth WORLD CONGRESS OF ESPERANTISTS.

Reports that have arrived show that the Prague congress was as interesting and successful as any of its forerunners, and comes an easy first in the matter of attendance.

The five parts of the world were represented, twenty-four European countries, five American, two Asian, and two African sending delegates, while our own Australians were much in evidence. It is interesting to note that 36 professors, 30 engineers, 22 lawyers, 19 doctors, 14 journalists, 12 artists, 10 preachers, 201 teachers, and 671 commercial men were present. The activities of these when they return to their various lands must result in Esperanto becoming more and more universally useful.

The Australian delegates left London on 20th July. On reaching the Hague they joined sixty English and Scottish and some seventy Dutch Esperantists. After a pleasant stay of six days, the party left for Dresden, where they attended a meeting of 1500 delegates, who were on their way to Prague. Twenty-two delegates from as many different countries spoke for one minute each. The chief item was a speech of half an hour's duration, of course in Esperanto, by Dr. Privat. The party left Dresden on 30th July, and reached Prague some nine hours later, in time to take part in the welcome to Sin-

jorino Zamenhof. The congress was opened on the following day. S-ro Hudson estimates that more than 5000 persons were present, hundreds of whom stood during the whole of the five hours that the meeting lasted. After singing *La Espero*, Prof. Dr. Kamaryts, President of the Czechoslovakian Esperanto Association, introduced the Czechoslovakian Minister for Education and the Mayor, both of whom addressed the congress. Then the Secretary to the Standing Committee reported on the happenings of the past year, followed by Dr. Kamaryts and Dr. Privat, who outlined the progress recently made, thanked the Czechoslovakian Government for their welcome and assistance. Dr. Nitobe, the Japanese delegate to the League of Nations, said that possibly the League would soon accept Esperanto as an official language. The English delegate to the League also spoke, but in English. Dr. Privat translated. He said that if Esperantists wished the League to accept Esperanto they must continue to press the matter. Then the authorised delegates, one from each nation, 40 in all, each spoke for one minute. S-ro Hudson was the third speaker. When Australia was announced, and he rose to speak, the applause lasted for more than a minute. At later meetings it was decided to erect a

monument in memory of Dr. Zamenhof, to write to all Governments recommending the teaching of Esperanto in all schools, and to send the same recommendation to the League of Nations. A scheme for reorganising the Esperanto executive was considered, and will be dealt with by the next congress, after details have been worked out. The "liberaj horoj" were devoted to a concert, a costume ball, a theatrical presentation, visits to the ancient town hall and castle and to Moravia karsto to inspect the underground river, lakes and caves. Our delegates started for Budapest on 6th August, intending to stay there for two days, and thence to proceed to Italy. To sum up, our delegates have had a wonderful time, and the "open sesame" to all these pleasurable and educative experiences was "nia kara lingvo," ESPERANTO.

Here and There.

In Sofia S-ro Atanasov is instructing 70 teachers. The Minister of Education, S-ro St. Omarčevski, has arranged that Esperanto shall be taught in the technical schools.

The town council of Offenbach has introduced Esperanto into the local schools. There are 350 pupils, comprising 12 classes. Seven thousand marks have been allocated for the payment of teachers and for providing instruction books free to the pupils.

The third Russian Congress was held in June. Over 150 delegates were present, some of whom travelled from 1500 to 2000 miles to attend. The congress received reports which show that the progress of Esperanto in Russia is greater than ever, and as Russia has always been in the van of the Esperanto movement, this news is very encouraging.

S-ro Cuzon was elected official delegate from the Paris Fair authorities to the Prague Congress.

In accordance with the decision of the Paris Chamber of Commerce, Esperanto is now taught in four commercial schools.

The Barcelona Chamber of Commerce recently expressed the desire that Esperanto should be more widely known, because it would greatly facilitate international commercial relations.

Kion Faras la Esperantistoj Institucioj.

Pro tio, ke multaj Esperantistoj volas scii, kion nun faras Akademio, ni presas ĉi kune eliajn aĵojn el la Deklaracio farita la 10an de decembro kaj publikigita en "Lingva Internacia." Per enkonduka letereto de S-ro Th. Cart, la prezidanto de la Lingva Komitato, forte konsilante severan disciplinon por konservado de internacian unuecon de nia lingvo, ni severan fidon al la Zamenhofa Fidejmento. "Ne kuŝas nia esenca forto en pli diras, "en pli malpli granda efekteco de la lingvo mem, sed en la ke ni ĉiuj uzas saman lingvon komunan. . . . Sufiĉas, se lingvo eblas por ĉiuj facilakirebla, se ĉiuj homoj pensojn, eltrovojn laborojn ĝi povas esprimi. Ke tiujn kondiĉojn ni trovas efektive nia Esperanto, tio pruvis dum pli ol tridekjara periodo ne teorie, sed per faktoj, pli kaj plenkventaj ol ĉia rezonado. . . ."

La Deklaracio mem komencas jene:—

Nelonge antaŭ la eksplodo de la milito la Akademio publikigis "Duan Oficialan Aldonon" al la Lingvaj Institucioj, pro multaj materiaj malhelpoj baroj, pro neebleco de interkompunikiĝo, pro la morto de la prezidanto, pro la neregula situo de triono de ĝiaj anoj, kiuj rebalototaj, ĝia laboro kompreneble haltis kaj ne povis ne halti.

Sed tuj, kiam la cirkonstancoj ebligis la regulajn balotojn kaj refunkciadon de niaj Lingvaj Institucioj, la Akademio, senbrue senreklame, sed senprokraste diligente, rekomencis labori. Ĝi nur preparas la baldaŭnan starigon la "Tria Oficiala Aldono," sed pri esploras ankaŭ kelkajn aliajn urgajn demandojn, kaj speciale preparadon de Teknikaj vortaroj.

Tial ke estas certe, ke la antaŭa labormetodo estis iom malrapida. Akademio atente ekzamenos la proponon pri eventuala reorganizo de la Lingva Komitato kaj modifoj en la regularo.

Ĉar, alivarte, pro troa diskreteco kaj nesufiĉa publikeco de la laboro de la Akademio kaj de la Lingva Komitato, multaj Esperantistoj inklinaĵoj malprave kredi kaj maltrankviliĝi, ke la Lingvaj Institucioj

metas, tial la Akademio de nun konigos la disvolvigon de siaj laboroj per komunikoj sendotaj al la Esperanta gazetaro. La plenaj oficialaj dokumentoj aperos, kiel kutime, en la "Oficiala Gazeto." La Akademio danke akceptos ĉian kunlaboradon de spertaj kaj kompetentaj Esperantistoj.

La jena deklaro montras, kiaj estas, laŭ ĝia opinio, la devoj de la Esperantistaro kaj tiuj de la Lingvaj Institutioj.

La daŭrigo de la Deklaracio estas en du partoj. La unua, titolita "Difino kaj devoj de la Esperantistaro," detale konsilas singardon pri la enkonduko de novaj vortoj, por ke konservu la internacian unuecon kaj evitu la danĝeron, ke la lingvo en kiu ajn lando akirus nacian karakteron.

"Tiu ĉi mortiga danĝero ne estas duba," diras la deklaro, "ĉar ĝi kuŝas en la kondicoj mem de la lingvo: la uzantoj de nacia lingvo, pro la praktikaj necesoj de konstanta interkomunikigo kaj interkomprenigo, ne povas libere ŝanĝi aŭ riĉigi la lingvon laŭ persona gusto kaj kaprico; ilia libereco estas severe limigata de la necesa tuja komprenebleco. Por ke ili estu komprenataj, ili devas paroli sammaniere, kiel ĉiuj ĉirkaŭ ili parolas. La konstanta praktika uzado de la lingvo estas do konstanta senkonscia korektilo kaj kritikilo."

La dua parto de la Deklaracio portas la titolon, "Difino kaj devoj de la Lingvaj Institutioj." Ĝi diras, "La Lingva Komitato kaj ĝia Akademio ne havas la rajton iniciati iun ŝanĝon, korekton aŭ aldonon, nek krei novajn vortojn; ili devas nur konstati, kontroli, elekti, konsili, rekomendi aŭ malrekomendi: ili estas nur ordigiloj modorigiloj kaj reguliloj, kiuj celas konservi la necesan unuecon kaj harmonion. . . . La rolo de la akademio, kiu estas nur organizantaro por la laborado de la Lingva Komitato kaj de la prilingvaj nekomitatitaj kompetentuloj, estas, tute same, kiel tiu de ĉiuj Akademioj en la mondo, rolo esence konserva: la Akademio devas unue malhelpi rompon de la fundamentaj gramatikaj reguloj kaj malrespekton de la fundamenta vortaro; due ĝi devas zorgi, por ke la evoluado de la lingvo fariĝu laŭ la principoj, reguloj kaj instruk-

cioj entenataj en la fundamentaj dokumentoj."

Bulgara Eksperimento.

Lastatempe estis ĉe ni je tagordo la laborimposto, perioda fizika laboro plenumata senpage por la ŝtato de ĉiuj bulgaraj regnanoj de la 18-a ĝis 45-a jaro (anstataŭ militservo).

Tiu ĉi kuraĝan leĝdonan reformon, kiu havas karakteron de sociala eksperimento de laborservo, realigis la nun reganta agrarista registaro por iom faciligi la devojn laŭ la "pac-traktato" en Neuilly.

La laborservo donis rezultatojn, kiuj ne povas esti malatentataj. En ĉiu alia lando ĝi renkontus malhelpojn, sed en Bulgario, en kiu la servuto estis aplikata tutajn jarcentojn sub la turka reĝimo, la eksperimento ne estas kontraŭtradicia. Precipe en la vilaĝoj, en kiuj sepjara militado malhelpis la plenumon de multaj societ-aferoj, la laborposto donis bonegajn rezultatojn. Multaj stratoj, ĝardenoj, pontoj, kanaloj ktp. estis farataj aŭ riparataj.

Multaj konfesas, ke en tiu originala sistemo Bulgario trovis praktikan rimedon por mildigi la ekonomian krizon, kiu pezas super la lando. Kaj efektive, nur per la laboro estas eble restarigi la ruinitajn ekonomiajn valorojn dum la du militoj kaj krei al la nacio kondiĉojn por pli intensa ekonomia progreso.

Interese estas konstati, ke la junuloj, kiuj estas vokataj por fari sian laborservon, ĝoje aperas. Ili scias, ke oni ne plu okupos ilin per pafiloj kaj kanonoj, ne plu instruos ilin mortigi, sed pasigos tra skolo de ekonomia eduko, post kies fino ne nur la regno havos profiton de ilia laboro, sed ankaŭ ili mem revenos en siajn domojn kun bonaj scioj pri la terlaboro kaj diversaj metioj kaj lernos ami sian landon.

La sola malhelpo, kiun unuatempe renkontas la labordirekcio ĉe la realigo de siaj taskoj, estas la manko de monrimedoj. Sed post 2-3 jaroj tiu mondemandado ne plu ekzistos, ĉar ĝis tiam la laboro tiel aranĝigos, ke de la modernaj maŝinoj kaj laborejoj la Labordirekcio ne nur sukcesos subteni sin mem, sed donos ankaŭ bonan profiton al la regno.

(Laŭ Iv. H. Krestanoff, en "Esperanto Triumfonta").

Afrika Rakonto.

Kapro, Leono kaj Serpento.

Kapro kaj Leono, kuniginte por societo, vojaĝis duope, preter arbaro, ĉe kies fino estis komunumo da homoj, komferte loĝitaj en vilaĝo, ĉirkaŭita per alta, pinta palisaro. Kapro diris al Leono:—

“Nu, de kie vi venas hodiaŭ?”

“Mi venas de festeno, kiun mi donis al multaj miaj amikoj—la leopardo, hieno, linko, lupo, ŝakalo, sovaĝa kato, bubalo, zebro kaj multaj aliaj. La longakola ĝirafo kaj la elando kun la malalte pendanta kolhaŭto ankaŭ estis tie, kiel ankaŭ la saltema antilopo.”

“Vere, tio estas belega societo, diris Kapro, kun sopirĝemo. Mi estas kompatinda solulo. Neniu sin ĝenas pri mi, sed estas abundo da herbo kaj dolca foliaĵo, kaj kiam mia ventro fariĝas ronda kaj granda pro pleneco, mi serĉas molan lokon sub arbo kaj remaĉas, reve kaj kontente. Rilate aliajn malfeliĉojn, mi konas neniajn dum mi vagas, krom malforta piko de malsato.”

“Ĉu vi vere diras, ke vi ne envias mian realan dignecon kaj forton?”

“Mi ne envias ĝin, ĉar ĝis nun mi ne informiĝis pri ĝi.”

“Kio! Vi ne scias, ke mi estas la plej forta el ĉiuj loĝantoj en arbaro aŭ sovaĝejo? Ke, kiam mi muĝegas, ĉiuj aŭdantoj mallevas la kapon kaj kuntiriĝas pro timo?”

“Efektive, mi ne sciis ĉion tion, nek mi estas tute certa, ke vi ne erarigas vin, tiel pensante, ĉar mi konas multajn, kies atakaj povoj estas multe pli danĝeraj, ariko mia, ol la viaj. Certe, viaj dentoj estas grandaj kaj viaj ungegoj akraj, kaj via muĝo estas sufiĉe laŭta, kaj via aspekto impona. Tamen, en ĉi tiu arbaro, mi konas etan estaĵon, kiu estas multe pli timinda ol vi, kaj mi pensas, ke, se vi konkuris kontraŭ ĝi en batalo, tiu sama malgrandegulo venkus.”

“Uf,” diris Leono, senpacience, “vi faras min kolera. Eĉ hodiaŭ ĉe la festeno ĉiu ĉeestanto konfesis, ke li estas nur malfortulo en komparo kun mi, kaj vi konsentos, ke, se mi ungogratus vin nur unufoje, vi ne restus viva.”

“Tio, kion vi diras pri mi estas vero, sed, kiel mi antaŭe diris, mi ne pretendas posedi multan forton. Sed ĉi tiu malgranda estaĵo, kiun mi

konas, kredeble ne estis inter gastoj.”

“Kio povas esti tiu malgranda estaĵo?” moke demandis Leono.

“Serpento,” respondis Kapro, ŝajnigante neintereson, dum remaĉis.

“Serpento!” ekkriis Leono, mirigita. “Kion! tiu rampa besteto, kiu sin nutras per musoj kaj dormantaj birdoj — tiu mola rampaĵo, kiu similas vinberbranĉon, kaj kiu kunvolvas en tufoj de herbo branĉoj de arbetoj?”

“Jes, tio ĝuste estas ĝia nomo kaj karakterizo.”

“Nu, mia nura pezo disprenus kiel frakasitan ovon.”

“Mi ne volus provi ĝin, se mi estus vi. Ĝiaj pikdentoj estas pli akraj, viaj grandaj, tranĉaj dentoj aŭ ungegoj.”

“Ĉu vi volas veti pri ĝi kontraŭ mia forto?”

“Jes.”

“Kaj se mi venkos, kio estos perdpago?”

“Se vi postvivos la batalon, diris Kapro mi estos via sklavoj, kaj povos ordoni min laŭ via plaĉo en la ajn celo.” “Sed kion vi donos al mi se vi malvenkos?”

“Mi donos kion ajn, laŭ via plaĉo.”

“Nu, do, mi elektas cent penikoj da bananoj; prefere vi alportu ilin tien, apud mi, antaŭ ol komenci.”

“Kie estas tiu serpento, kiu batalu kontraŭ mi?”

“Apude. Kiam vi alportos bananojn vi trovos lin ĉi tie.”

Leono fiere paŝis for, por alporti bananojn, kaj Kapro iris en arbaron, kie li vidis Serpenton da mome kunvolviĝinta en multaj voloj sur maldika branĉo.

“Serpento,” diris Kapro, “vekita Leono furiozas por batali kontraŭ tiu Li vetis cent penikojn da bananoj ke li venkos, kaj mi vetis mian vivon ke vi estos la fortulo, kaj, atentu obeu miajn konsiletojn, kaj mia vivo estos en nenia danĝero, kaj mi estu provizita je manĝaĵo dum almenaŭ kvin lunoj.”

“Nu,” malvivece parolis Serpento “kion vi deziras, ke mi faru?”

“Vi kuŝu sur arbeto ĉirkaŭ la ulnojn alta, kiu troviĝas apud la loko kie la batalo okazos, kaj kiam Leono estas preta, levu alte kaj fiere via kapon kaj petu lin alproksimiĝi al vi por ke vi povu lin bone vidi, ĉar vi

estas miopa, kaj li, plena de sia malmodesto, malestimos vian maldikan formon kaj paŝos al vi, ne sciante vian metodon de atako. Tiam enfiksu viajn pikdentojn en liajn brovojn, kaj volvu vin ĉirkaŭ lian kolon. Se ia forto restas en via veneno, kompatinda Leono post nelonge kuŝos rigida."

"Kaj se mi tion faros, kion vi faros por mi?"

"Mi estos por ĉiam via servanto kaj amiko."

"Konsentite," respondis Serpento, "Montru al mi la vojon." Nu, Kapro kondukis Serpenton al la loko de la batalo kaj Serpento sidigis sin, kiel Kapro konsilis, sur la foliriĉa supro de juna arbeto.

Baldaŭ Leono alproksimiĝis, kun longa vico de servemaĉaj bestoj, portantaj cent penikojn da bananoj, kaj, forsendinte la portintojn li turnis sin al Kapro kaj diris:—

"Nu, Kapĉjo, kie estas via amiko, tiu, kiu estas pli forta ol mi? Mi estas iom inklina lin vidi?"

"Ĉu vi estas Leono," diris siblanta voĉo, el la supro de arbeto.

"Jes, mi estas. Kiu vi estas, kiu ne konas min?"

"Mi estas Serpento, amiko Leono, kaj mia vidpovo estas malbona kaj miaj movoj estas malrapidaj. Alproksimiĝu al mi, ĉar mi ne vidas vin."

Leono eligis laŭtan muĝan ridon kaj iris sentime proksimen al Serpento, tiel proksimen, ke lia spirado ŝajne blovis la maldikan formon en vibrantan movadon. Serpento jam antaŭe levis la kapon kaj kurbigis la kolon.

"Vi jam tremas," moke diris Leono.

"Jes, mi tremas, sed nur por pli bone frapi, amiko mia," diris Serpento, ĵetante sin antaŭen kaj fiksante la pikdentojn en la dekstran brovon de Leono, kaj en la sama momento ĉirkaŭ la kolon de Leono glitis la serpenta formo, kaŝita for de la vido en la abunda kolhararo.

Kiel la doloro de fajro, la morta veneno tuj efikis en la kapo kaj korpo. Kiam ĝi atingis la koron, Leono falis kaj restis senmova kaj mortinta.

"Bone farita," kriis Kapro, dancadante ĉirkaŭ la amaso da bananoj. Manĝaĵo por mi dum tri lunoj kaj la fanfaronema muĝulo ne estas pli valora, ol mortinta kapro."

Kapro kaj Serpento tiam amikiĝis. Serpento diris, "Nun, sekvu min, kaj obeu, mi havas iom da laboro por vi."

"Laboro! Kia laboro, ho Serpento?"

"Ĝi estas facila kaj agrabla. Iru laŭ tiu voĵeto. Vi trovos vilaĝon de homoj. Proklamu kion mi faris; montru tiun kadavron al la loĝantoj. Rekompence, ili alte estimos vin, kaj ĉiun tagon vi trovos abundan manĝaĵon en iliaj ĝardenoj, molajn foliojn de manihoto kaj arahiso, maturajn bananojn kaj sufiĉe da sukplenaj verdaj folioj. Por diri la veron, kiam vi grasiĝos, kaj festeno estos okazonta, ili buĉos kaj manĝos vin, sed por via gento pli bonaj estos la komforto, pleneco kaj varma, seka loĝejo, ol malvarma, malseketa ĵangalo kaj pereco per rabaj bestoj."

"Ne, nek la laboro nek la sorto estas malĝojiga, kaj mi dankas vin, ho Serpento, sed por vi ne estas ia hejmo krom la arbetoj kaj la herba tufo, kaj vi estos ĉiam timinda mal-amiko de ĉiuj, kiuj alproksimiĝos al via restejo."

Tiam ili disiĝis. Kapro iris laŭ la voĵeto kaj atingis la ĝardenojn de vilaĝo, kie virino hakis brullignon. Levante la rigardon ŝi vidis, ke grandkorna besto alproksimiĝas blekante.

Ŝia unua impulso estis forkuri, sed vidante, dum ĝi blekis, ke ĝi estas furaĝmanĝulo, havanta nenian atakopovon, ŝi deŝiris iom da manihotaj folioj kaj allogis ĝin al si; ĉe tio Kapro diris al ŝi:—

"Sekvu min, ĉar mi havas strangan aferon por montri al vi ne malproksime."

La virino, mirante, ke kvarpieda besto povas paroli al ŝi per kompreneblaj vortoj, sekvis lin, kaj Kapro trotis malrapide antaŭ ŝi ĝis la loko, kie kuŝis mortinta Leono. Tiam la virino demandis:

"Kion signifas ĉi tio?"

"Tio estis la reĝo de la bestoj; ĉiuj loĝantoj en la arbaro kaj sovaĝejo vivas en timo pro li. Sed li tro fanfaronadis pri sia povo, kaj tro fieriĝis. Tial mi incitis lin batali kontraŭ malgranda estaĵo de la arbaro kaj, vidu, la fanfaronulo estis venkita."

"Kaj, kiel estas la nomo de la venkinto?"

"Serpento."

"Ha, vi parolas veron. Serpento estas reĝo super ĉiuj, krom Homo," respondis la virino.

"Vi estas saĝulino. Serpento konfesis, ke Homo estas lia superulo, kaj sendis min por esti servutulo al Homo. De nun Homo nutros min per verdaj folioj, sukplenaĵoj ekstremaĵoj de vegetaĵoj, kaj min loĝigos kaj defendos, sed kiam venos festotago, Homo buĉos min kaj manĝos mian karnon. Tio estas la vortoj de Serpento."

La virino aŭskultis al ĉiuj vortoj de Kapro kaj konservis ilin en sia memoro. Tiam ŝi senigis Leonon de lia peltito kaj portis ĝin al la vilaĝo, kie ŝi mirigis sian parencaron per rakonto pri tio, kio okazis al ŝi. De tiu tago ĝis la nuna la Kapro restas kun la gentoj de la Homo, kaj la homaro estas danka al Serpento por lia donaco al ĝi, ĉar se Serpento ne estus ordoninta Kapron, ke ĝi iru en kuneston kun Homo, li estus ankoraŭ sovaĝa besto, kiel lia frato, la Antilopo.

(Angle verkis Henry M. Stanley, fama esplorinto de Afriko. Tradukis Esperanten Karolo Madrigalo).

Papera Pulpo el Herbo.

Dum oni faris atestaĵon, ĉe Darwin, antaŭ la Federacia Komitato pro Publikaj Laboraĵoj, estis dirite, ke ekzistas granda ebleco por la fabrikado de papera pulpo el bambua herbo, kiu kreskas en la Norda Teritorio. Oni diras, ke provoj jam estas faritaj kaj ke la rezultatoj estas tre kuraĝigaj.

Ekperimentoj, faritaj en 1917 kun la herbo el la Norda Teritorio montris ke la herbo produktas proksimume saman kvanton de pulpo kiel oni havigas el sparta herbo.

La neblankigita pulpo estas de mezebona kvalito, taŭga por fari mezefortan brunan paperon. Post plua traktado, kaj kiam blankigita, ĝi povas esti uzata por la farado de bonakvalita blanka papero.

Kroniko.

Melburno, V.—La loka sekcio de A.E.A. regule kunvenadas ĉiutage vendredon. La meznombro de ĉeestantoj estas 40. Sukcesaj plinikoj lastatempe okazis ĉe Ringwood kaj Eltham. La "Suda Kruceto" duka Rondo komenciĝis. Preskaŭ 20 personoj aliĝis. Ankoraŭ estas loko por alia dudek.

Whangarei, N.Z.—La Esperantistaro en la norda regiono de Aŭstralio land estas ĉiutage pligrandiganta, kaj Esperanto antaŭeniras rapide kaj firmege. Multaj Esperantistoj trovas ĝas en la norda regiono, sed ĉi plimulto loĝas en Whangarei, la ĉefurbo de la regiono. La Whangarei'a Esperanta Grupo progresas bonege. La tuta urbo estas bone informita pri Esperanto. La urbestro kaj aliaj gravaj personoj favoras nian laboron. La komitato de la publika biblioteko promesis konsideri la formadon de Esperanta sekcio, kaj oni esperas havigi en ĝi tre baldi ĝishodiaŭnan kolekton da legaĵoj.

Pri la telegrafa fako, la Esperantistoj elprovis, ke oni povas telegrafi en la lingvo. Plue, certa sinjoro telegrafis al amiko per senfaden telegrafo, kaj trovis, ke lia sendaĵo estis ricevita tute prava.

Estas notinde, ke la plej granda ĉiutaga ĵurnalo en la nordo subtenas nian movadon, kaj jam donas altvaloran helpon.

Perth, Okcidenta Aŭstralio.—La samideanoj sukcese laboras. La edukada departemento permesas uzon de ĉambro en Perth Chief De School en du vesperoj ĉiun semajnon. Kurson por lernantoj gvidas S-ro Leighton kaj Caine. Konversaraŭ rondo kunvenadas ĉiun vendredon. S-ro Caine ankaŭ instruas anojn de Perth Y.M.C.A.

Sidnejo, N.S.-K.—Nova kurso komencis kunveni ĉe 124 George Street North. Dudek lernantoj. S-ro John Joliffe instruas.

HAROLDO PUDNEY

Kuracisto de Fonto-Plumoj

Ĉu vi havas kriplan fontoplumon, kiu malhelpas vian skribadon? Portu ĝin al li, kaj li tute rebonigos ĝin. Aŭ ĉu vi deziras fontoplumon POŝTE VI MEM AŬ POR VIA AMIKO? Li havas multajn el ĉiu speco, je prezo facilaj por via monujo. Mendoj per poŝto estas lia specialo. Memoru la adreson:

7 EQUITABLE PLACE, MELBOURNE.

Barraba, N.S.-K.—S-ro E. A. Pryke
starigis novan kurson.

Nekrologioj.

Antoni Grabowski, Polo.

Mortis en Varsovio, la 4an de julio, Antoni Grabowski, unu el la plej malnovaj esperantistoj. Li estis la unua kun kiu Dro. Zamenhof parolis Esperanton, kaj de kiu la majstro ricevis la unuan tradukon esperantan. S-ro Grabowski estis inĝeniero de hemio, kaj interesiĝis en Esperanto en 1887. Li studis la rusan lingvon, kaj havis en sia lernolibro rakonton, "Neĝa Blovado" de Puŝkin, kiel ekzercan tekston. Provante la esprimkapablon de Esperanto, li ĝin tradukis kaj donis al Dro. Zamenhof. Li estis aŭtoro de traduko de Goethe, "La ĝefratoj" (1889), "Kondukanto internacia de interparolado" (1890), "La Nova Jaro" de B. Prus kaj "Janko Muzikanto" de Sienkiewicz "Mazepa" de Wasniewski, "Halka" de Montuszkom, opero ludita dum Oka kongreso en Krakow, "Parnaso de Popoloj" (poemoj el preskaŭ ĉiuj kulturaj lingvoj, "Sinjoro Tadeo" de Mickiewicz (ampleksa verko enhavanta preskaŭ 10,000 versojn). Ses poemoj, de li tradukitaj, sin trovas en "Fundamenta Krestomatio." En la lastaj jaroj, li verkis multajn poeziaĵojn, kaj prave oni ŝatis lin kiel veran majstron de la poezio. Grabowski estis membro de Esperantista Akademio, Prezidanto de Pola Esperanto-Asocio. La morto trafis lin subite, sur la strato, dum li rigardis esperantaĵojn metitajn post la montra fenestro de Esperanto-Oficejo.

Samuel Meyer, Franco.

Tre pezan frapon de la sorto ni suferis pro la morto de s-ro Sam. Meyer, unu el niaj eminentuloj, kies literaturaĵoj montras ĉiaman ĉarmecon kaj admirindan klarecon. S-ro Meyer naskiĝis en La Rochelle februaron, 1864a, kaj en sia junaĝo vojaĝis en Germanujo, Anglujo, Holando kaj Svedujo. Li sciis dek du lingvojn; kaj tiu praktika scio ebligis lin plene taksi la valoron de Esperanto. Li verkis multajn artikolojn por "Lingvo Internacio" kaj "La Revuo," kaj tradukis "L'Avare," "Le Barbier de Seville," "Carmen" kaj "Sois Homme." Antaŭ kelke da monatoj, atakis lin la gripo, kaj li neniam poste ĝuis plenan sanon.

"The Esperanto Guide."

Translation of the Exercises.

Exercise 20.—Mi nun legas la libron, kiun vi pruntis al mi, kaj mi trovas ĝin tre interesa. Niaj junaj amikoj sidas ĉe sia tablo kaj skribas silente sub la okuloj de sia patro. Vi ĉiuj, miaj infanoj, devas lerni diligente, se vi volas fariĝi homoj vere utilaj al via patrujo. Hodiaŭ, se mi ne eraras, estas merkredo, kaj postmorgaŭ estos vendredo. Kiam vi renkontis lin? Hieraŭ, kaj mi tre miris, ke li salutis min tiel ĝentile, ĉar mi scias, ke li estas tre fiera. Kion vi serĉis? Mi serĉis mian arĝentan horloĝon, sed mi ĝin ne trovis. Mi tre kredas, ke mi vidis ĝin sur via tablo antaŭ du horoj. Ĉu vi pensas, ke pasis nur du horoj de tiu tempo? Du aŭ tri; sed ni kune serĉu; eble ni retrovos ĝin. Kiam mi alvenis, vi ĉiuj ankoraŭ dormis. Je kioma horo mi vekos (or: mi veku) vin? Veku min je la kvina, ĉar mi devas foriri tre frue. Si mi estus tiel riĉa, kiel vi, mi donus monon al tiuj, kiuj bezonas ĝin. Certe via instruisto tuj venus al ni, se oni dirus al li, ke ni alvenis. Mi ne punus vin, se vi pli bone sciis vian lecionon. Ĉesu petoli, kaj tuj respondu al mi. Ordonu, ke li laboru pli diligente. Diru al la infanoj, ke ili ne tuŝu tiujn paperojn. Ili venu, kaj ni kune aranĝos tion. Ni bone uzu la tagon.

Exercise 38.—Mi serĉas iom da malvarmeto, sed ne povas trovi ĝin; estas tiel varme hodiaŭ. Kial li ridetas? Sidante sur la bordo de la rivereto, la knabo lernis sian lecionon tre atente. La knabineto maldolĉe ploris, ĉar ŝia patro, por puni ŝin, forprenis ŝian pupon. Kia bruego! Kio okazas? Pluvetas. Pardonu min, sinjoro; vi eraras, pluvegas. Ŝi ploretis la tutan tagon, ne sciante kial; se ŝi rekomencos morgaŭ, mi sendos ŝin al la lito sen la vespermango. Ne tuŝu tiun teleron; ĝi estas varmega. Lia amiko estas la plej granda babilulo, kiun mi iam aŭdis. Mi petis de vi varman akvon, kaj vi alportis al mi malvarman. Li estas malsaneta.

Poŝtm. interŝanĝ. Rudolf Schmidt, Gresten, Austrujo, po 50 aŭ pli diversaj p. m. de ia lando, mi sendos la kvanton samvalore, Germanen-Austrujo.

The Esperanto Ball.

The plain and fancy dress ball held annually in Melbourne, in addition to providing a pleasant evening's amusement for those who are fond of dancing, has always been a notable success from a propaganda point of view. This year's ball will be held in the Gregory Hall, Chapel Street, Windsor, on Thursday, 13th October. Those who are making the necessary arrangements will consider themselves amply rewarded if there is a large attendance to enjoy the pleasures of good company, good music and a good programme.

Leda Jurnalo uzos Esperanton.

Franca gazeto de leda industrio "Le Cuir," ("La Ledo"), dezirante enkonduki en ĝia eksporta eldono: "La Indekso de ledaj industrioj," fakon en esperanto, petas ĉiujn esperantistojn interesiĝantajn pri la leda komerco aŭ industrio, kiel teknikistojn, komercistojn aŭ oficistojn, sendi ilian adreson kun la indiko de la profesio al ĉefredaktoro de "Le Cuir," 54 Rue de Bondy, Paris.

Gazetoj Ricevitaj.

Argentina Esperantisto, n-ro 39. Enhavas tre malmulton da Esperanto.
Brazila Esperantisto, n-ro 1-4. Raporto pri la 6a Brazila kongreso, kiu estis brila sukceso.
Bulgara Esperantisto, n-roj 6, 7, 8. Versajne Esperanto post nelonge estos devige studata en la lernejoj.
Esperantista Junularo, n-ro 3. Du pecoj por traduki estas akompanataj de utilaj klarigoj.
Esperanta Triumfonta, n-roj 39, 43. Tre neregule alvenas. Tion ni bedaŭras, ĉar la enhavo ĉiam estas leginda.
La Espero, Osaka, n-ro 2.
Franca Esperantisto, n-ro 7-8.
Hispana Esperantisto, n-ro 49.
Hungara Esperantista, n-roj 5, 6.
Itala Esperantisto, n-roj 6-7.
Kataluna Esperantisto, n-roj 6, 7. Ra-

porto pri dua kunveno de Ibe-
Esperantistoj. **L'Esperanto**,
4-5. Tre utila kompara tabelo
esperanta sinonimaro. La kajero
havas multajn ilustraĵojn. La Mon-
Esperantiste, n-ro 3. La Progres-
n-ro 6. **Verda Utopio**, n-ro 6. E-
porto pri mirinda eltrovo de Japo-
kamparono, kiu povas elfabri-
arĝenton el ĉia materialo!

Black: "Estis grandega amaso
nia preĝejo hodiaŭ vespere."

White: "Populara predikisto?"

Black: "Ne, ĝi forbrulis."

Sinjoro en restoracio ekman-
kokinaĵojn, kiun li trovis tre malma-
— He, kelnero, li kriis moktone,
kion da jaroj havis tiu ĉi kokino?
— Sinjoro, respondis la kelne-
rigide, — la kokinaĵojn ni servas k-
pansaŭco, kaj ne kun biografioj.

S-ro B. Szepessy, Arany y. u. 2
Miskolcz, Hungary, deziras interŝan-
poŝtmarkojn kun la tuta mondo. Pro-
ferus ricevi pli ol 200-300 samtemp-
Rekompencos laŭ katalogo Ivert 19
aŭ Senf 1921. Respondos al ĉiuj s-
prokrasto.

Al Niaj Subtenantoj.

Ni ricevis the jenajn sumojn, k-
abonojn por la dua jaro, k-
danko:—A. Parnell, 1/-; C. France
chini, 4/6; C. M. Hannaford, 4/
E. M. Wallace, 4/6; — Street, 4/
A. Hughes, 4/6; D. Mackey, 4/
S. Giles, 4/6; H. F. Alderman, 4/
E. A. Sinnotte, 4/6; P. Williams, 4/
A. J. Doyle, 4/6; A. M. Carter, 4/
P. T. Hogg, 4/6; R. N. Crichto-
4/6; H. Byatt, 4/6; M. Hackett, 4/
I. James, 4/6; N. Grant, 4/6;
Wheeler, 4/6; A. McKenzie, 4/
E. Hanks, 4/6; H. E. Neville, 5/
H. R. Smith, 4/6; W. C. Moore, 4/
C. H. O'Dwyer, 4/6; H. Hogg, 4/6.

Cole's Book Arcade, Melbourne.

Two Million Books and Pieces of Music.

Send for "The Rainbow." Cole's Monthly about Books.

Free to You.